

Kultura vivo en Romandio

Claude Gacond, 71-a radioprelego, 1964.04.08 & 11

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la kultura vivo en Romandio. Vi aŭdas Claude Gacond.

Specifa spirita kaj literatura vivo komenciĝas en Romandio (francilingva Svislando) kun la Reformacio. Komence de la dekseca jarcento Ĝenevo, Vaŭdo kaj Neuŝatelo adoptas la reformitan kredon. Antaŭe Ĝenevo jam estis rifuĝejo kontraŭ la atakoj de la cenzuroj de la potencaj najbaraj reĝlandoj. De nun ĝi fariĝos, kun la aliaj protestantaj kantonoj, la rifuĝejo al kie rigardos kaj alkuros miloj da persekutatoj. El tiu malvasta teritorio disvastiĝos monden kun la kalvinismo demokrata sinteno. Ĝenevo, kaj tio malgraŭ la netoleremo, kiu naskiĝas inter la katolikoj kaj la protestantoj, fariĝas vojkruĉejo por ideoj. Edmond Privat en *La Lanterne et l'épée* skribas : « Ne tunoj da varoj, sed marŝanta spirito trapasas tiun aerblovon inter Francio kaj Germanio, Britlando kaj Italio. »

La observo de la religia netoleremo de la dekseca jarcento povas nin helpi lumigi la politikan netoleremon de la dudeka jarcento. Tiam kiel nun alfrontiĝas du ideologioj, ni eĉ diru, du veroj. La reformita netoleremo respondis al la roma netoleremo, iom kiel hodiaŭ la marksista netoleremo respondas al la liberala netoleremo.

Hodiaŭ estas facile kritiki la netoleremon de Calvin. Tion farante ni ne devas forgesi, ke tiu organizanto, kodiganto, leĝofaranto ne povis montri sin tolerema sen endanĝerigi siajn realigojn. La saman konflikton inter toleremo kaj revolucio vivis ĉiuj reformistoj. Ĝi pereigis multajn diktatorojn kaj malbonfamigas ilian memorigon. Ekzemple pri Calvin oni pli ofte rediras la sektemon, ol la konstruigan verkistan influon. La katolika historiisto pri renesanca beletro Pierre Jourdain tamen konstatas, ke Calvin, kiel verkisto, « kreis tuj la stilon de la moderna teologio, forlasis la mezepokajn postvivaĵojn kaj aldonis al la franca literaturo novan fakon. » La doktrinemulo, kiu instruis, ke « Dio eterne antaŭdestinis al damno la plejmulton de la homaro », kaŝas en nia memoro la fondinton de la famaj ĝenevaj kolegio kaj akademio.

Alfred Berchtold, en sia riĉiga verko *La Suisse romande au cap du XXème siècle*, kiun mi jam prezentis al vi antaŭ unu monato, prave diras : « Kia estu nia juĝo pri Calvin, evidentaĵo restas : viro faris de eta civito, simila al tiom da aliaj, la ĉefurbon de ideo, la citadelon de kredo, spiritan kaj intelektan centron, kiu elradios dum pluraj jarcentoj sur konsiderindan parton de Eŭropo kaj de l' civilizita mondo. ». Kaj li daŭrigas : « De nun ekzistas mito pri Ĝenevo : nova Jerusalemo por unuj, erarejo je la okuloj de aliaj. »

Kiam alfrontiĝas du ideologioj, malmultaj homoj kuraĝas rezisti al la facila kaj vivtrankviliga solvo boji kun unu el la hundaroj kontraŭ la alia. Sed tamen, en ĉiuj epokoj kaj malgraŭ ĉiuj ajn premoj, homoj kun kuraĝo riskis siajn laboron kaj vivon por esprimi liberan vidpunkton. Inter la hundaroj ili provis resti homoj. Anstataŭ boji kun la aliaj, ili provis aŭdigi pli homan alvokon.

Alfred Berchtold en sia verko pri Romandio citas la kuraĝan sintenon de Sébastien Castellion, la estro de la ĵus fondita kolegio, tradukisto de la Biblio, sciencemulo kaj rimarkinda pedagogo. El liaj diroj mi provos raporti al vi la ĉefajon.

En 1544, pro kverelo kun la ĝeneva pastaro kaj Calvin, Sébastien Castellion devis fuĝi en Bazelon. En tiu alemana urbo li travivis longajn jarojn en malriĉeco. Tamen en 1552 li ricevis en la bazela universitato la katedron pri la greka lingvo. Pro la luktolaciĝoj kaj mankoj li mortis nur 48-jara en 1563. Per tiu prezento de lia personeco mi provos, kun unu jaro de malfruiĝo, rememorigi la kvaran jarcenton de la morto de kuraĝa defendanto de la vero.

Michelet skribis pri li : « Sébastien Castellion starigis por la estonto la grandan leĝon pri toleremo. » Alfred Berchtold aldonas : « La dialogo Calvin-Castellion estas la eterna debato de la protestantismo. » En Castellion Alfred Berchtold vidas antaŭulon de la teologio de la

Kultura vivo en Romandio

Claude Gacond, 71-a radioprelego, 1964.04.08 & 11

19-a jarcento, kaj precipe de iu romandia teologio, por kiu pli gravas la karito, ol la emo al dogmaj certecoj. Castellion kontraŭstarigas la liberon al la antaŭdestino, la kritikemon al la absoluta aŭtoritato de la Skriboj. Li ne kredas la racion senhelpe perversigitan ; li insistas je la rolo de la volo rilate al la kredo kaj kristana vivo ; li pensas al la imitado de Jesuo Kristo kaj nomas « sanan doktrinon » tiun, kiu kondukas al morala perfektigemo. Li kredas, ke Dio volas la savon de ĉiuj homoj, sed atendas de ili kunlaboran strebon. Li abomenas pli ol ĉio la konsciencan devigon. Por li, vero konsistas en la diro de tio, kion oni pensas, kvankam oni erarus. « Erari, li diras, tio ne signifas blasfemi. » Antaŭ Gandhi li diras : « Kiu ni estas por kondamni la aliajn ? La batalenda malamiko ne estas tiu, kiu pensas aliel ol mi, ĝi estas la peko loĝata en mia propra koro. »

Por Castellion kia absurdaĵo voli uzi ĉi-teran kirason en spirita batalo. « Mortigi homon, li diras, tio ne estas defendi doktrinon, tio estas mortigi homon. Kiam la ĝenevanoj mortigis Servet, ili ne defendis doktrinon, ili mortigis homon. »

Alfred Berchtold, kiu redonis al ni per sia libro la rememoron pri Castellion, diras pri li : « En la deksesa jarcento, kiam imperieme tondras la granda voĉo de Calvin, alia voĉo leviĝis, pli dolĉa, sed ne malpli firma, kiun oni provis silentigi kaj kiu ne silentis, kaj kiu neniam silentos... » (Fino de la citaĵo.)

Meze de dogmaj disputoj Sébastien Castellion kuraĝis aserti (mi citas lin) : « La sola leĝo, kiu eternas, estas la leĝo trovata el la naturo kaj gravurita en la profundo de niaj koroj, ĝi trudas sin al ĉiuj popoloj... Ĝi estas skribita en la konsciencoj... Ĝia kono estas ena al ĉiu homa animo. »

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la kultura vivo en Romandio aŭ franclingva Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-